N. N. 31,

Dum fluas klaraj fontoj

tradukita de Joachim Gießner

1. Dum fluas klaraj fontoj,
Freŝiĝi volas ni.
Knabinon mi ne voku,
Per manoj gestas mi.
Knabinon mi ne voku,
Mi ne voku,
Per manoj gestas mi.

2. Per frapo de piedo
Alfluas mia am'.
Jen inter la knabinoj
La mia estas jam.
Jen inter la knabinoj
Knabinoj
La mia eatas jam.

3. Kaj ĉu mi ŝin ne amu?
Ĉar estas ŝi anĝel'.
Okuloj respegulas
Bluaĵon de l'ĉiel'.
Okuloj respegulas
Respegulas
Bluaĵon de l' ĉiel'.

...

4. La vangoj estas ruĝaj
Samkiel ruĝa vin'.
Pli ĉarma ne troviĝas
Ol tiu belknabin'.
Pli ĉarma ne troviĝas
Ne troviĝas
Ol tiu belknabin'.

Traduko de la Germana poemo "Wenn alle Brünnlein fließen" de N. N. 31 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-617-1240 (2012-10-17 21:59:49)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`*, pli precize sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`*.*